

## La Jaroj Pasinta kaj Nova

preparis Leston Buell

Kvankam ĉi tiu temo ne ŝajnas tre originala, tamen ĝi donos al ni la oportunon por iom kontatiĝi kun la gravaj okazoj en la vivo kaj pensado de niaj kunrondanoj.

### 1. Demandoj

1. Kiuj estis la plej gravaj okazoj kaj ŝanĝoj en via propra vivo dum la pasinta jaro, pozitivaj kaj negativaj.
2. Nun pensu je pli grandskala nivelo. Kiuj estis la lej gravaj okazoj kaj ŝanĝoj por nia lando kaj por la tuta mondo. La plej evidentaj okazoj estus verŝajne politikaj kaj militaj. Ĉu, laŭ vi, okazis gravaj okazoj en aliaj kampoj? Ekzemple, en la arta kampo, la ekonomia, la sana/kuraca, ktp.
3. Ĉu, laŭ vi, la ĝenerala situacio en Usono pliboniĝis dum la pasinta jaro aŭ plimalboniĝis?
4. Ĉu troviĝas alia lando kiu tre gravas al vi, ekz. via naskiĝlando? En tiu lando, ĉu la situacio pliboniĝis aŭ malpliboniĝis?
5. Ni kutimas fari « rezolutajn decidojn » por la nova jaro, tio estas, onia decido aŭ ĵurpromeso al si mem por efektigi difinitan projekton aŭ deziratan ŝanĝon en sia propra vivo kaj por atingi difinitan celon dum la nova jaro. Ĉu ankaŭ vi faris tiel ĉi-jare? Kiajn decidojn vi faris? Ĉu ili similas al tiuj, faritaj ankaŭ komence de la pasinta jaro? Ĉu vi kredas, ke la plejparto de la novjaraj decidintoj vere atingas siajn celojn?
6. Kiuj estas viaj plej gravaj esperoj por la nova jaro. Estu realisma! Kiuj aferoj ŝajnas vere atingeblaj en la kampoj, kiuj plej gravas al vi mem? Ne forgesu pensi ne nur al politikaj aferoj, sed ankaŭ pri aliaj kampoj.
7. Nun ni estas aŭdintaj viajn esperojn por la nova jaro kaj nin turnas al pli negativa aspekto. Kiujn aferojn vi plej timas dum la nova jaro? Provu specifi unu aferon, kiu maltrankviligas vin pli ol ĉiuj aliaj, pensante pri la venontaj dekdu monatoj.

8. En la mondo, ekzistas diversaj kutimoj por festi la Novan Jaron. Kiuj estas la kutimoj de via(j) propra(j) lando(j)?
9. Kiel vi mem festis la novan jaron ĉi-jare?